**Trejnilo de Esperanta Leksiko**
Prilaboris: **Ryszard Rokicki**

# TESTO 2

## **Ekzerco 1.** Enskribu ĝuste en la vortspacon.

**1.** Virina ␣ ␣ **d** ␣ **t** ␣ pli kaptas ol reto.

**2.** Post domaĝo ␣ ␣ **n** ␣ ␣ saĝo.

**3.** Ŝparu kiam ␣ ␣ **n** ␣, vi havos kiam bezone.

**4.** Eĉ el sub la ␣ ␣ **r** ␣ aperas la vero.

**5.** Kiu pli frue venas, pli bonan ␣ ␣ **k** ␣ ␣ prenas.

**6.** La diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la ␣ ␣ **c** ␣ ␣ **j**.

**7.** En la kota vetero mia vesto ␣ ␣ **rt** ␣ malpuriĝis, tial mi prenis broson kaj purigis ĝin.

**8.** Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi ␣ ␣ **n** ␣ ␣ la tutan libron en kvar tagoj.

**9.** La surtuto estas aĉetita de mi, ␣ ␣ **k** ␣ ␣ ĝi apartenas al mi.

**10.** Kiam en lia kapo ␣ **l** ␣ **n** ␣ formiĝis la plano de lia entrepreno, li estis vigla, plena de fortoj kvardek-ok-jara viro.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝuste en la vorton.

**1.** Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn **l** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ ␣.

**2.** Kun maldolĉo en la **k** ␣ **r** ␣ li forlasas Genuon por nova migrado kaj novaj provoj.

**3.** Nia lando venkos, ĉar nia **m** ␣ **l** ␣ **t** ␣ ␣ **t** ␣ **r** ␣ estas granda kaj brava.

**4.** "Jes, patrino", **r** ␣ **s** ␣ ␣ ␣ **d** ␣ ␣ al ŝi la malĝentilulino, elĵetante unu serpenton kaj unu ranon.

**5.** **M** ␣ **n** ␣ **r** ␣ al ili vian novan veston.

**6.** La fotografisto fotografis min, kaj mi **s** ␣ ␣ **d** ␣ ␣ mian fotografaĵon al mia patro.

**7.** Post infekta malsano oni **o** ␣ **t** ␣ bruligas la vestojn de la malsanulo.

**8.** La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en la plej **p** ␣ ␣ **k** ␣ ␣ **m** ␣ arbaro.

**9.** La filo de la reĝo **d** ␣ **m** ␣ ␣ **d** ␣ ␣ ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro kio ŝi ploras.

**10.** Neĝulino pli volonte restis hejme kun la patrino, **h** ␣ ␣ **p** ␣ ␣ ŝin en la mastrumaj laboroj, aŭ voĉe legis, kiam la laboro estis finita.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| |
|---|
| mult', don', riĉ', ali', alt', hom', feliĉ', vir', long', am'. |

**1.** Rakontu al mi vian ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ ␣ **ĉ** ␣ ␣, ĉar eble mi povos helpi al vi.

**2.** Inter la danĝeraj infektoj, la plej grandan damaĝon al la ␣ ␣ **m** ␣**r** ␣ kaŭzis variolo.

**3.** ␣ ␣ **r** ␣ **n** ␣, kiu kuracas, estas kuracistino; edzino de kuracisto estas kuracistedzino.

**4.** La ␣ ␣ ␣ **g** ␣ **c** ␣ de la konkursaĵoj ne estas fiksita – la ĵurio aprezas la fabelecon kaj originalecon de la verkaĵo.

**5.** La registaro **d** ␣ ␣ ␣ ␣ **n** ␣ ␣ monon por subteni novajn programojn; ĉi-jare mankis mono, tamen planataj estas iniciatoj rilate al kampara evoluigo.

**6.** Temistoklo edzinigis sian filinon je homo tre bona, sed ␣ ␣ **l** ␣ ␣ **ĉ** ␣ ĉar, li diris, "mia filino pli volas homon sen havaĵo, ol havaĵon sen homo".

**7.** Kaj oni ne nur umis kaj pli konkrete ␣ **m** ␣ ␣ **d** ␣ **m** ␣ ␣ (neeviteblega afero en la junulara medio), sed ankaŭ ne malofte lernis.

**8.** Germandevenaj kazaĥoj tute ne konantaj la germanan ␣ ␣ **l** ␣ ␣ **g** ␣ pli facile ricevas germanan civitanecon ol turkidoj naskitaj en Germanio.

**9.** Evidentas, ke la homa transviv-instinkto pretas oferi ␣ **l** ␣ ␣ **l** ␣ ␣ ␣ por savi la propran haŭton.

**10.** Tiu ĉi granda ␣ **l** ␣ ␣ **ĵ** ␣ ne estas natura monto.

## **Ekzerco 4.** Marku vorton korespondan plej ĝuste:

**1.** Magazeno, en kiu oni vendas cigarojn, aŭ ___, en kiu oni tenas cigarojn, estas cigarejo.

**a.** sinjoro **b.** formo **c.** ĉambro **d.** mano

**2.** Ni ĉiuj kunvenis por priparoli tre ___ aferon, sed ni ne povis atingi ian rezultaton kaj ni disiris.

**a.** kelkan **b.** lastan **c.** gravan **d.** plenan

**3.** Donu al la birdoj akvon, ĉar ili ___ trinki.

**a.** kredas **b.** laboras **c.** legas **d.** volas

**4.** Vi skribas, kaj la infanoj skribas, ili ĉiuj ___ silente kaj skribas.

**a.** sidas **b.** finas **c.** iras **d.** deziras

**5.** Li ___ rozokoloran superveston kaj teleroforman ĉapelon.

**a.** portas **b.** helpas **c.** demandas **d.** kredas

**6.** ___ homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.

**a.** Tutaj **b.** Plenaj **c.** Kelkaj **d.** Samaj

**7.** Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia ___.

**a.** tero **b.** deziro **c.** vojo **d.** mondo

**8.** Grandega hundo ___ sur min sian antaŭan piedegon kaj mi de teruro ne sciis, kion fari.

**a.** iris **b.** helpis **c.** metis **d.** ĝojis

**9.** Mi sidas sur seĝo kaj ___ la piedojn sur benketo.

**a.** komprenas **b.** tenas **c.** konas **d.** finas

**10.** Ni faris la kontrakton ne ___, sed parole.

**a.** skribe **b.** milite **c.** move **d.** okaze